estas la teejmastro,« tial mi vole-nevole mortigis ilin. Ha, mi sentas min senforta en la fundo de la stomako. Ha, verŝu al mi rizbrandon.

Ojumi. Bone, jen, sed kiel granda estas la monsumo?

Iĉikuroo (prenante du monzonojn kaj du monujojn, unu por viro, kaj la alian por virino, el la brusto). Ŝajne ili timis, ke io okazos survoje, ĉar ili havis ĝin dividitan inter ili. Ankoraŭ mi ne kalkulis ĝin, sed laŭ la sento, ĝi estas kvardek rjooj.

Ojumi. Do, lasu ke mi vidu. (Elĉerpante la monon.) Estas tridek oraj moneroj, dudek arĝentaj kaj kvardek malpligrandaj. Ĉirkaŭ kvindek rjooj. Estas riĉa ĉaso, kian ni ne havis lastatempe. (Prenante la vestaĵojn sur la genuojn.) Kaj la vestaĵoj ĝojigas min, vere. Jen estas longa subvesto el skarlata krepo kaj blankstriita nigra zono el peza silko. (Kvazaŭ okaze ekrimarkante ion.) Atendu, mia kara. Kion vi faris pri la harornamaĵoj?

Iĉikuroo. La harornamaĵoj? Kion signifas harornamaĵoj?

Ojumi. Jes, jen. Harornamaĵoj. La harornamaĵoj de la virino.

(Iĉikuroo ne respondas.)

Ojumi. Kun punktita silkvesto kaj longa subvesto el skarlata krepo, ŝiaj harornamaĵoj kredeble ne devus esti falsaj kombiloj kaj riglilo, ĉu ne? Antaŭ momento, kiam ŝi demetis la karikĉapelon, mi kaŝrigardis ilin, kaj ili estis el testudŝelo senerare.

(Iĉikuroo silentas.)

Ojumi (alpremante sin al li). He! Ŝajnas al mi, ke vi forgesis preni ilin, ĉu ne? Ĉar ili estas el testudŝelo, ili certe kostas sep aŭ ok rjoojn. Se vi, ne freŝ-

bakita rabisto, revenas sen tia valoraĵo, por kio vi mortigis? Kiam vi komencis tiun ĉi okupon, ke vi preterlasas la harornamaĵojn post kiam vi mortigis virinon tiel vestitan? Ĉu vi neniam ĉesos fari absurdaĵojn? Kiel vi pensas? Parolu.

Iĉikuroo (montrante abomenon). Ĉu vi ne parolas tro terure? Certe ne estas krimo, ke senigante ŝin je la vestoj, mi lasis al ŝi la harornamaĵojn almenaŭ kiel virinajn malgrandajn trezorojn por kunporti al la postmondo.

Ojumi. Hu! Estas dirita la afekta prediko. Se vi lasos ilin kuŝi tiel, ĉu ili ne gluiĝos al iu alpelita almozulo, kiel milio al malseka mano? Tuj ekkuru rapide kaj prenu ilin.

Iĉikuroo (kun intensa malamo al la virino). Oni diras, ke virino komprenas virinon kaj viro komprenas viron; estas pli bone imagi vin sur la loko de la mortinta virino. Kiel virino, ĉu vi ne sentas iom da kompato por ŝi?

Ojumi (mokeme). »Larmoj en la okuloj de diablo,« estas bone dirite. Se ŝi estis tiel kompatinda, kial vi sufokis ŝin per tiu punktita viŝtuko.

Iĉikuroo (forŝirante la viŝtukon de sia talio kvazaŭ terurita). Ha, mi estas tute malsana de tiu ĉi okupo.

Ojumi. Ĉar vi fuŝas la aferon. Ne lamentu, mia kara. Tuj ekkuru. Post noktiĝo ne troviĝas eĉ hundido sur tiu ĉi vojo. Ili certe estas tie ankoraŭ, do tuj alkuru. Ĉu ne estas sensence heziti pri tio, kio speciale venas al ni? Kaj vi ne estas speco, kiu hezitas, ĉu ne?

(Iĉikuroo profundiĝas en silenton kaj diras nenion.)

Ojumi. Ho! Al mi ŝajnas, ke vi estas ofendita, ĉar mi kritikis vian mallertecon, ĉu ne? Mi ne volas

vin tedi, sed ĉu vere vi ne intencas iri? Ĉu vi intencas ellasi la akiraĵon de efektivaj dek rjooj el viaj manoj?

(Iĉikuroo en profunda silento ne donas respondon.) Kion ajn mi diras, vi ne volas iri, ĉu ne? Mi do mem tuj ekkuros. Estas la kutima loko, mi supozas?

Iĉikuroo (eksplodeme). Kompreneble. La pinarbareto sur tiu ĉi flanko de Jabuhara.

Ojumi (ekstarante kaj suprenfaldante la jupon). Mi do iros. Estas lunlumo kaj estas hele ekstere, kaj, vi estas ĝeniĝema rabisto, bone. (Iras en la korton kaj enŝovante la piedojn en siajn pajlsandalojn, estas ekironta.)

Iĉikuroo (turnante akran rigardon al ŝi). Ĉu vere vi iras?

Ojumi. Kial ne?

Iĉikuroo. Estas limo eĉ en kanajlaĵo.

Ojumi. (de ekstere). Fi, zorgu vian aferon. Ha, estas bela lunluma nokto. (Kuretas for.)

Iĉikuroo (ekstarante). Ha, fine ŝi iris. (Eliras.) Ŝi ne aspektas homo, kiam ŝi kuras tra la malalta striita bambuarbaro. Ŝi estas kiel lupo kroĉanta sin al kadavro. (Rigardas momentojn post kiam ŝi malaperis, kaj poste ŝancele eniras la domon. Prenante la botelon sur la plado, malplenigas ĝin per ektiro.) Ha, ŝi estas diablino, ŝi estas diablino min posedanta. (Kaptas sian kapon kaj tordas sin dum kelka tempo. Subite rimarkante la vestojn de la viro kaj tuŝante ilin, tenas la manon supren al la lumo.) Estas sango. Tamen, estas sango sur ili. (Rigardas gape antaŭen.) Kiam mi forte premis, tiuj du blankaj manoj ĉirkaŭvolvis mian manon kiel serpento aŭ io simila. Ha, mi ne povas elporti. (Dolortordiĝas kvazaŭ por forskui malagrablan memoron. Post kelkaj momentoj, kvazaŭ okaze frapita de ia

ideo.) Jen ĝi estas. Antaŭ ŝia reveno. (Leviĝas kaj elprenas du aŭ tri vestojn el la kamero. Rapide pakas ilin per paktuko. Okaze rimarkas la rabitajn monujojn lasitajn de la virino apud la pleto. Metas ilin en la bruston de sia vesto.) Ha, mia eterna amo malvarmiĝis. (Rapidas ekster la pordon. Subite metas la manon sur la monon en la brusto. Staras kaj pripensas. Returne paŝas du aŭ tri paŝojn kaj pripensas. Fine elprenas ĝin kolere.) Ĝi estas mono malpura. (Forte ĵetas ĝin en la domon. La ormoneroj elsaltas el la monujoj kaj sin rulas dise en la ĉambro brilante. Iĉikuroo forkuras kiel li nur povas.)

(Kurteno.)

AKTO III.

Sceno I.

(Printempe de la dua jaro de An'ei (1773), pli ol dudek jarojn post la okazaĵoj en Akto II. La loko estas Ao-no-Doomon ĉe Jabakei en Kjuuŝuu. Pro oportuneco oni uzas la nomon poste donitan. — La enirejo de la tunelo. Dekstre, la rokoj estas deŝiritaj kaj parto de l' Jamakuni Rivero estas videbla. La reston de la scenejo okupas griza rokmuro, en kies mezo estas la faŭko de la tunelo proksimume ses metrojn alta kaj ok metrojn larĝa. Malgrandaj ŝtonoj estas disĵetitaj ĉie ĉirkaŭe. Apud la rivero staras kelkaj junaj kriptomerioj. Laŭ la rando de la rokmuro, tabula ponto pendas danĝere. Ĝi sin apogas al ĉeno. Kiam la kurteno leviĝas, Maljunulo ŝajne de sufiĉa bonhavo, Kolportistino kaj Kamparano kun ĉevalo venas en ordo trans la ĉenponton timeme. Kiam ili ĉiuj trans-

iĝas, ili haltas kelkan tempon por ripozi sur la scenejo.)

Maljunulo (sidiĝas sur roko kun ekĝemo de trankviliĝo). Mi ĝojas, ke mi faris ĵurpromeson pilgrimi al Haĉiman Sanktejo de Usa unu fojon por ĉiu jaro, sed transiri tiun ĉi ĉenponton ĉiam egalas riski la vivon. Ĉar ne blovas la vento la lastajn tagojn kaj la pontotabuloj estas renovigitaj, nun ne estas danĝero por homa vivo, sed la paŝoj de maljunulo estas malfirmaj, malfirmaj.

Kolportistino. Mi estas loĝanto de Hida vilaĝo, kaj devas transiri la ponton ĉiutage, do mi jam alkutimiĝis, sed en pluvaj tagoj, kiam ĝi estas glitiga kaj skuiĝas pro la vento, estas vere danĝere.

Kamparano (fine veninte trans la ponton kun sia ĉevalo). Ha, estis malfacilege. Survoje, kiam mi pensis, ke jam la ĉevalo obstiniĝos, mi tremis de timego.

Kolportistino (al la Kamparano). Sinjoro Sakuzoo. Efektive vi devas esti atenta. Estas vere danĝere, kiam vi estas kun ĉevalo. Se vi enfalus kun la ĉevalo kiel sinjoro Sinnemon de Kakizaka en la lasta jaro, tio estus via fino.

Kamparano (ŝerce). Se mi mortus kun vi, almenaŭ la homoj babilus pri ni, sed morto kun ĉevalo ja estus morto de hundo.

(Du Ŝtonhakistoj venas el la tunelo portante ŝarĝon de ŝtonhakaĵoj.)

Kamparano. Hola, Ŝoo-don. Vi laboras diligente, ĉu ne? Ĉu la laboro iom progresis?

Unua Ŝtonhakisto (demetante la ŝarĝon kaj sidiĝante sur ĝi). Nenia ŝanĝo, de kiam mi venis. Ĉar ni traktas grandegan rokegon, ni ne povas trahaki eĉ dudek metrojn en duona jaro aŭ unu.

Kamparano. Povas esti. Povas esti. Komence mi pensis, ke ĝi estas tiel neebla laboro, kiel rigardi la sunon tra la trueto de kudrilo. Sed la persistemo de sinjoro Rjookai estas admirinda. Komence oni nomis lin »Freneza Bonzo,« aŭ »Trompisto,« kaj kiam mi estis juna, mi mem ĵetis unu aŭ du ŝtonojn post li. Sed oni klinis la kapon antaŭ lia persistemo. Oni diras, ke la ŝtonhakistoj estas duobligitaj, de kiam la distriktestro donis al li rekompencon.

Dua Ŝtonhakisto. Ĝis nun ni trahakis kvar kvinonojn de ĝi, tial nun restas tre malgranda laboro. Lastatempe, sinjoro Rjookai preskaŭ ne dormas en la nokto.

Maljunulo. Mi deziras ĝisvivi iamaniere, ĝis tiu ĉi tunelo estos preta. Kaj laŭ tiu ĉi mezuro, ŝajne mia deziro estos plenumita.

Kamparano. La kamparanoj de la sep vilaĝoj de Jamakuni-valo malpacience atendas ĝian pretiĝon. Mi mem intencas helpi ankaŭ en tiu ĉi jaro tuj, kiam mi finos la plantadon de rizo. Mi timas, ke mi estas tro komforta lasante sinjoron Rjookai mem fari ĉion.

(Multaj Kamparanoj alvenas de maldekstre.)

Dua Kamparano (irinte al la faŭko de la tunelo kaj streĉante la orelojn). Ha, ĝi fariĝis profunda. Antaŭ du aŭ tri jaroj, ankoraŭ la sono de la marteloj aŭdiĝis ĝis la faŭko.

Tria Kamparano. Fariĝis profunda. Tre profunda. Mi vetis kun Rinhaĉi de la najbara vilaĝo, ke tio bezonas unu jaron kaj duonon, kaj laŭ tiu ĉi mezuro, mi gajnos.

Kvara Kamparano. Vi, senhonta fripono! Pro sinjoro Rjookai penanta plene kovrite de polvo, vi estos punita de Ĉielo.

Tria Kamparano. Tute ne. Sinjoro Rjookai ĉiam diras, ke li ellaboras sian propran saviĝon, kaj ankaŭ por ni estas eterna la graco, ĉu vi ne memoras?

Kvara Kamparano. Nur por pagi pro sia krimo, ĉu homo povas fari tiel grandegan laboron kiel tiu? Ĉio estas pro lia sankta ĵuro por elaĉeti ĉiujn vivulojn. Kiam mi estos libera, ankaŭ mi intencas helpi.

Tria Kamparano. Bone, diru mensogon. Vi ĉiam diras, ke vi helpos, jaron post jaro, kaj vi ne prenis martelon eĉ unu fojon ankoraŭ, ĉu ne?

Kvara Kamparano. Ĉu ne estas same pri vi?

(Dum la Kamparanoj interparolas, Ĵicunosuke envenas. Li estas en simpla vojaĝvesto kaj portas katunan pluvmantelon. Kiam li vidas la tunelon, li rigardas la planon de la ĉirkaŭaĵo iom ekscitite, kaj poste ekzamenas la ĉenponton kondukantan dekstren kaj revenas kaj enrigardas la tunelon. Intertempe li tiras al si la atenton de la Kamparanoj.)

Ĵicunosuke (fine aĵparolas la Duan Kamparanon). Pardonon mi petas! Mi deziras vin demandi pri io. Oni diras, ke en la tunelo estas bonzo nomata Rjookai, sed ĉu tio estas vero?

Kamparanoj (kune). Kial tio ne estus vero? Sinjoro Rjookai ja estas preskaŭ la posedanto de tiu ĉi tunelo.

Ĵicunosuke. Ĉu jes? Mi do deziras demandi plu, kiomjara li estas proksimume?

Unua Ŝtonhakisto (suspekteme rigardante la nekonatan militiston). Sinjoro Rjookai estas pli ol kvindek-jara. Jam baldaŭ estos ŝesdek.

Ĵicunosuke (trankvile). Mi aŭdis, ke lia naskiĝloko estas Kaŝiŭazaki en Eĉigo.

Unua Ŝtonhakisto. Jes, ĉiuokaze li diras, ke ĝi estas regiono, kie multe neĝas.

Ĵicunosuke. Ĉu vi ne aŭdis, ke li servis en Edo dum sia junaĝo?

Dua Ŝtonhakisto. Jes, mi aŭdis, ke li servis. Foje li rakontis al mi pri la prospereco de Asakusa Kanzeon.

Ĵicunosuke (fine streĉiĝante). Dankon pro via informo. Kaj ĉu tio ĉi estas la sola enirejo de la tunelo?

Unua Ŝtonhakisto. Jes, estas videble. Por malfermi la alian transe, sinjoro Rjookai nun entreprenas suferigan penlaboron.

Ĵicunosuke. Kiel longa estas la tunelo?

Dua Ŝtonhakisto. Kion vi volas fari post tia demando?

Ĵicunosuke (enpensiĝinte momenton). Mi volas vidi tiun sinjoron Rjookai. (Li estas eironta.)

Unua Ŝtonhakisto. Atendu. Homo ne konanta la lokon, ne povas enpaŝi. Rokoj elstaras tie kaj ĉi tie kaj kavoj estas tre multaj.

Ĵicunosuke. Do, ĉar mi havas kun li aferon, ĉu vi ne bonvolus al li diri, ke iu faris la tutan vojon de Eĉigo por lin vidi?

Unua Ŝtonhakisto. Tuj mi enkuros kaj diros al li. (Enkuras.)

Dua Ŝtonhakisto. Ĉu vi estas parenco de sinjoro Rjookai? Ĉiu en la sep vilaĝoj de tiu ĉi Jamakumi valo estas de li treege helpata. Ni ŝuldas al li koran dankon. (Sin klinas.)

Maljunulo (venante antaŭen). Eble lia reputacio ne povis atingi de Kjuuŝuu tute ĝis Eĉigo, sed sinjoro Rjookai estas de la popolo de la sep vilaĝoj de tiu ĉi

valo tiel dankata kiel Ĵiĉi Bosacu.[1]) (Klinsalutas. Returne rigardas la aliajn.) Jen estas lia parenca sinjoro militisto. Ĉiuj esprimu vian dankon. (Ĉiuj klinsalutas kune. Ĵicunosuke, iom konfuzita spirite, resalutas facile.)

Maljunulo. Vi ne povas esti lia filo, ĉu ne? Ĉu vi estas lia nepo? Estu plej bonvenanta ĉi tie. Kie en la mondo vi aŭdis pri tio?

Ĵicunosuke. Mi estis en vojaĝo por viziti ĉiujn provincojn, por ekzerci min survoje en glavarto, kaj mi ricevis la informon de iu ĉe Haĉiman Sanktejo en via provinco.

Maljunulo. Tio estas certe renkontiĝo dank' al la graco de Ĉielo.

Dua Kamparano. Jam pasis dudek jaroj ĝis tiu ĉi jaro. En la daŭro de tiu longa tempo li penlaboris kun sia tuta koro. Li diras, ke tio estas por elaĉeti liajn ripetitajn krimojn plenumitajn en lia juneco, kaj lastatempe li svingas martelon eĉ en la nokto.

Ĵicunosuke (duone al si mem). Por elaĉeti siajn ripetitajn krimojn? Sed la kruelega malvirto, mortigo de sia sinjoro, ne povas esti forviŝita. (Ridas mokeme.)

Maljunulo. Eĉ mortigo de sia sinjoro tio estis? Sed per tiu spirito, eĉ tio, eble, estas forviŝita.

Ĵicunosuke. Ĉu tio estas forviŝita aŭ ne, vi vidos baldaŭ. (Ridas ironie.)

(La homoj komencas iom suspekti Ĵicunosuke'n kaj flustras inter si. Tiam Rjookai elvenas kun du Ŝtonhakistoj subtenantaj lin ambaŭbrake. Ĵicunosuke kaŝe malsekigas la vinkton en la tenilo de sia glavo. Rjookai estas malgrasega kaj osteca, kaj liaj

[1]) Nomo de Budao.

kruroj sub la genuoj estas precipe maldikaj. Kvankam lia deŝiriĝinta robo montras, ke li estas bonzo, liaj haroj kreskis longe kaj kovras lian sulkozan vizaĝon. Liaj okuloj estas nebulaj kiel cindro. Kiam li eliĝas el la tunelo, li ŝanceliĝas kvazaŭ blindigita de subita lumo. Kiam la Kamparanoj ekvidas lin, ili surgenuiĝas kaj adorkliniĝas.)

Dua Ŝtonhakisto (helpante Rjookai'n). Gardu vin.

Rjookai (palpante per siaj manoj). Kie li estas? Kie li estas?

Dua Ŝtonhakisto. Jen ĝuste tie. Tuj tie.

Rjookai (kvazaŭ li trovis malklaran figuron de Ĵicunosuke). Kiu vi estas? Miaj maljunaj okuloj estas kadukiĝintaj kaj vidas tre malfacile.

Ĵicunosuke (iom surprizita de la ekvido de sia kadukiĝinta malamiko kaj perdinta la streĉan severecon alprenitan je la komenco.) Ĉu vi estas nomata sinjoro Rjookai?

Rjookai. Jes, mi estas. Kaj vi?

Ĵicunosuke (iom ekscitite). Kiel ajn vi aliformiĝis vin en bonzon nomatan Rjookai, aŭ kiel ajn vi nomas vin, eble vi ne mensogos. Vi ne forgesis, kiel en via juneco, nomata Iĉikuroo, vi mortigis vian sinjoron, Saburobjoe Nakagaŭa, en Edo kaj forkuris, ĉu ne?

Rjookai (montrante per trankvila sed humila voĉo ke li, kvankam bedaŭras sian krimon, estas savita de siaj pekoj). Mi ne forgesis. Mi ne forgesis. Kaj kiu estas vi, kiu diras tion?

Ĵicunosuke. Eble vi ankaŭ tion ne forgesis. Mi estas Ĵicunosuke, unusola filo de Saburobjoe.

Rjookai (verŝante maldolĉajn larmojn). Sinjoro Jicunosuke! Mi memoras. Mi bone memoras. Kiu mortigis vian patron kaj forkuris, estis neniu alia ol tiu ĉi mizera Rjookai.

Jicunosuke. Mi pasigis ĉirkaŭ dek jarojn de doloro kaj agonio por venĝi mian patron kontraŭ vi, vi, monstra mortiginto de sia mastro kaj forkurinto. Ĉar ni renkontiĝis nun ĉi tie, jam estas tro malfrue forkuri, do batalu kun mi juste.

Rjookai. Vi tre longe suferis. Mi tre bedaŭras. Mi nur pensis pri la elaĉeto de miaj pekoj. Mi neniam pensis, ke mi kaŭzis al vi tiom da doloro. Nu, forprenu mian vivon. (Komencas iom vidi.) Fine mi vidas vian vizaĝon. Al mi ŝajnas, ke mi kvazaŭ rigardas la vizaĝon de via patro kun ĉagrenego antaŭ miaj okuloj. Nu, forprenu mian vivon. Eble vi jam aŭdis; tiu ĉi fosaĵo estas tunelo, kiun tiu ĉi mizera Rjookai deziris fosi por elaĉeti siajn pekojn, kaj post dudek jaroj, preskaŭ ĝi estas finita. Kvankam mi mortos, tio ne bezonos nun pli ol unu jaron. Nu, forprenu mian vivon. Se mi falos per via mano kaj fariĝos ofero priverŝante la enirejon de tiu ĉi tunelo per mia sango, mi estos kontenta.

Jicunosuke (kortuŝite sed penante ne deturniĝi de sia longe konservata intenco). Konvena rezignacio. Vere, eĉ se oni klopodis por bona rezulto, oni ne povas sin liberigi de la repago pro sia malvirto. Estas bone, ke vi kriu viajn lastajn laŭdojn al Budao.

(Komence la Kamparanoj kaj Ŝtonhakistoj staras tro mirigite pro la neatendita turno de la afero. Meze de ĉio ĉi, ili komprenas, ke la vivo de Rjookai estas en danĝero. Unu el la Ŝtonhakistoj iras internen por fari alarmon.)

Dua Stonhakisto. Hola. Ĉiuj venu eksteren. (Krias per laŭta voĉo en la tunelon.)

(La Ŝtonhakistoj, ĉiu kun ŝtalmartelo en la mano, elvenas kriante, kaj, formante larĝan cirklon ĉirkaŭ Ĵicunosuke, protektas Rjookai'n. Rjookai, forŝirante sin de ilia protekto, baraktas por proksimiĝi al Ĵicunosuke.)

Ĉefŝtonhakisto. (retenante lin). Kion vi intencas fari al sinjoro Rjookai?

Ĵicunosuke (vidante la homamason, elingigas la glavon. Observante en ĉiu direkto.). Tiu maljuna bonzo estas la mortiginto de mia patro. Hodiaŭ okaze mi renkontis lin kaj efektivigas mian kordeziron. Se vi ŝirmas la malvirtegan kanajlon, kiu mortigis sian mastron, al vi surfalos la puno de ĉiuj dioj kaj Budaoj.

Ĉefŝtonhakisto (spite). Venĝo estas afero de la mondo de vivuloj. Kiel vi vidas, sinjoro Rjookai jam forlasis la mondon. Krome, li estas adorata kiel Budao ne nur de la sep vilaĝoj de Jamakuni valo, sed ankaŭ de la loĝantaro de ĉiuj vilaĝoj en Bungo kaj Higo apud Jamakuni Rivero. Kiel ni povus lasi tian homon morti senutile?

Ĵicunosuke (tute indigne). Ne diru plu. Ne diru plu. Eĉ se li forlasis la mondon, la terura krimo, mortigo de sia sinjoro, estas unu el la ok damnindaj pekoj. Se vi baros mian vojon, mi batos vin ĉiujn kaj faros el vi amason de kadavroj. (Kun indigno, li estas sin ĵetonta kontraŭ ili svingante la glavon. La Ŝtonhakistoj eligas krion kaj ĉiuj levas sian martelon samtempe. La Kamparanoj prenas ŝtonojn kaj estas pretaj ĵeti ilin.)

Rjookai (baraktante senespere). Neniu peku. Se eĉ unu el vi ĵetos ŝtonon aŭ ektuŝos tiun ĉi militiston

eĉ per unu fingro, Rjookai malamos tiun. Pro la amikeco, kun kiu vi longe helpis min, nur lasu min morti laŭ mia deziro. Mi konas sufiĉan kaŭzon, kial mi devas morti. La sento, pro kiu mi deziris fosi tiun ĉi tunelon, estas la sama kun la sento, pro kiu mi deziras morti nun ĉi tie. La pretiĝo de la tunelo jam estas videbla. Cetere, nenio povas doni al mi pli grandan plezuron, ol morti per la mano de tiu ĉi fileca filo. Neniu peku.

Ĉefŝtonhakisto. Pro tiu kaŭzo, ĉu vi supozas, ke ni povus apudstari kaj vidi vin morti antaŭ niaj okuloj?

Rjookai. Anstataŭ rigardi mian morton, se vi bonvolus intertempe dehaki almenaŭ unu malgrandan spliton da ŝtono, mi trovus pli grandan plezuron en tio, ol en via lasta beno. Nu! Retiriĝu!

Dua Ŝtonhakisto. Tion mi ne povas. Se vi mortus, oni ne scias, kiel realiĝus tiu ĉi grandega projekto. Ni kapablas elporti la batalon kun tiu ĉi neŝancelebla rokego tage kaj nokte nur, ĉar vi observas nin. Via morto estus, kvazaŭ en unu nokto repleniĝus la tunelo, kiun ni jam fosis.

Ŝtonhakistoj (ĉiuj parolante samtempe). Vere. Vere. Vi ne devas. Vi ne devas morti.

Dua Kamparano. Vere, Vere. Kio nin ĝojigas de longe, tio neniiĝos. Sinjoro Rjookai ne devas morti.

Jicunosuke. Ĉio estas finita. Neniun mi pardonos, kiu malhelpos min.

(Jicunosuke estas sin ĵetonta sur la Ŝtonhakistojn kun la glavo. Ŝtonoj flugas kiel hajlo. Li retiriĝas.)

Rjookai (dolortordiĝante). Ĉu vi volas montri al mi la agoniojn de Infero, dum mi ankoraŭ vivas sur la tero? Pro la pekoj de Rjookai, ĉu vi vundos la plej filecan militiston? Batu lin eĉ per unu ŝtono

kaj vidu. Mi dismordos mian langon kaj min mortigos tuj ĉi tie.

(La Ŝtonhakistoj kaj Kamparanoj ĉesas ĵeti ŝtonojn. Ĵicunosuke rigardas al Rjookai, kaj estas ekbatonta lin per la glavo. La Ŝtonhakistoj kaj Kamparanoj denove faras decidan reziston. La Maljunulo forlasas la aliajn kaj alpaŝas al Ĵicunosuke.)

Maljunulo. Atendu. Via koro estas prava. Sed tia estas ankaŭ tiuj de la ŝtonhakistoj kaj kamparanoj. Do, trankviligu vin kaj aŭdu min bone. Kiel ajn vi baraktas, pli ol kvardek estas kontraŭ vi. Aldone, dum ni diskutas tiamaniere, la homoj de la tuta regiono parolas pri »Rjookai en danĝero« kaj sinsekve alkuros ĉi tien. Kiel ajn lerta vi estus en glavarto, vi ne povus batali kontraŭ homamaso. Nu, nun estas tempo pripensi. Aŭskultu, sinjoro militisto! La konstruo de tiu ĉi tunelo estas la vivĵuro de sinjoro Rjookai. Li rompis sian korpon kaj spiriton per penlaboro ĉirkaŭ dudek jarojn. Kiel ajn granda estas lia pekeco, ĉu vi ne povas vidi, kiel ĉagrenege estus morti, kiam la plenumiĝo de lia ĵuro jam estas videbla. Jen la kaŭzo, ke ili ĉiuj ŝirmas lin, Mi ne petas vin por longa tempo. Ĝis tiu ĉi tunelo estos tramalfermita, bonvolu lasi la vivon de sinjoro Rjookai en niaj manoj. Li estas kiel vi vidas. Li ne povus forkuri, nek sin kaŝi. Kiam la tunelo estos tramalfermita, faru kiel vi volas.

Ŝtonhakistoj kaj Kamparanoj. Jes, bone. Tre bone.

Maljunulo. Ili ĉiuj petas tiamaniere. Bonvolu forlasi la lokon por la nuna momento. Se vi bonvolus atendi, ni trovus domon, kie vi povus resti. Ĉiu el vi faru ĵurpromeson. Diru, ke, kiam la tempo venos, vi certe ne ŝanĝos la promeson.

Ŝtonhakistoj kaj Kamparanoj. Ni ĵuras. Ni ĵuras je la honoro.

Maljunulo. Sinjoro Rjookai, kiel vi opinias?

Rjookai. Kiam mi pensas pri la sufero de la nobla militisto, mi ne deziras vivi plu eĉ unu tagon.

Maljunulo. Tio ne devas esti. Via vivo estas kvazaŭ borilo de Budao por trabori la tunelon. Ĝis la tunelo estos preta, vi ne devas forĵeti ĝin facile. Sinjoro militisto! Ĉu vi aŭdis? Kia estas via ideo?

Ĵicunosuke (post momenta pripenso). Konsiderante la bonzecon de Rjookai, mi plenumos la peton. Ne forgesu la kondiĉon aldonitan.

Ĉefŝtonhakisto. Kial forgesi? En la momento, kiam la tunelo estos malfermita, estu la truo aŭ unu aŭ okono da colo, vi povos mortigi sinjoron Rjookai, kie li staros tiam. Venu, sinjoro Rjookai, neatendita afero okupis nian tempon. Venu, ni rekomencu la laboron.

Rjookai. Ne, ĉi tie kaj nun, mi — —

(Ĉar li provas resti, la Ŝtonhakistoj prenas lin surŝultren kaj forkondukas. Ĵicunosuke postrigardas lin kun bedaŭro.)

Maljunulo. Venu, mi kondukos vin al la restadejo. Ĉar ni faris tiun promeson, kvankam estas malafable kontraŭ sinjoro Rjookai tion diri, li estas kvazaŭ fiŝo en reto. Nur atendu vian tempon.

Ĵicunosuke (rigardante la tunel-enirejon kun ĉagreno). Kie Rjookai dormas en la nokto?

Maljunulo. Por li estas nek nokto, nek tago. Kiam li estas lacigita, li apogas sin al la roko, kie li sidas, kaj dormas. Tio estas afero, kion ordinaraj homoj ne povas fari.

Jicunosuke. Ĉu jes? (Enpensiĝante.) Ĉu hodiaŭ estas la sepa aŭ oka?

Maljunulo. La sepa.

Jicunosuke. (al si mem). La luno malaperas je la horo de rato.[1]) (Ridas mallaŭte.)

Sceno II.

(La interno de la tunelo. Nokto de la sama tago. La tuta scenejo estas unu solida muro el fendita roko. La tunelo finiĝas ĉe la dekstra flanko de la scenejo kaj Rjookai kaj aliaj tie laboras per marteloj. Fajro brulas malforte. La krakado de la marteloj aŭdiĝas jam antaŭ la kurten-leviĝo. Kiam la kurteno leviĝas, ĉiuj ĉesas labori.)

Unua Ŝtonhakisto. Kiam ni ĉiuj ĉesas kune, subite la silento trapenetras.

Dua Ŝtonhakisto. Nature, ĉar ni estas multajn metrojn sub la tero.

Tria Ŝtonhakisto. Ni ĉiuj devas resti apud sinjoro Rjookai hodiaŭ nokte, ĉar tiu militisto hodiaŭ veninta povus reveni por ataki lin ankoraŭ nekontentigite.

Unua Ŝtonhakisto. Ne necese. Ni sendis observanton al Hida-vilaĝo por konstante observi la lokon, kie li restas.

Dua Ŝtonhakisto. Ha, jam devas esti la horo de apro.[2]) Miaj manoj doloras ĝis sensentiĝo.

Rjookai (per raŭka voĉo.) Povas esti, ŝajne hodiaŭ la varmigo ne sufiĉis, kaj la roko estas neordinare malmola. Ha, ĉiuj jam lasu la laboron, kaj revenu al la budo. Ankaŭ mi nun ripozos. Nu, ĉiuj revenu.

[1]) Noktomezo.
[2]) La deka horo vespere.

Tria Ŝtonhakisto. Do, ni ĉiuj diru ĝis-revidon. Bonvolu ankaŭ ripozi, sinjoro Rjookai. Nu, mi alportos litaĵojn por vi.

(La Tria Ŝtonhakisto forkuras kaj tuj revenas kun pajla mato kaj makulita litkovrilo. Li etendas ilin sur la planko de la tunelo.)

Rjookai. Ha, dankon. Dankon. Do, permesu al mi. Mi enlitiĝos la unua. (Li kuŝiĝas.)

Unua Ŝtonhakisto. Do, sinjoro Rjookai, ni revidos vin matene.

Dua Ŝtonhakisto. Pardonu min.

Tria Ŝtonhakisto. Pardonu min.

(La Ŝtonhakistoj malproksimiĝas. Rjookai kuŝas kvazaŭ dormante por momento, poste levas sin denove.)

Rjookai (kunmetante la manplatojn, recitas Sanktan Skribaĵon per mallaŭta voĉo).* Ŝin-kan ŝooĵoo-kan. Koodai ĉie-kan. Hikan kjuuĵi-kan. Ĵoo-ganĵoo ŝoogoo. Muku ŝooĵoo koo. Eniĉi ha ŝoan. Noohuku saifuuka. Humjoo ŝoo seken. Hitai kai raiĵin. Ĵii mjoo daiun. Ĵu kanro hoou. Meĉuĵo bonnoo-en. Decidite de sinjoro Ĵicunosuke, kiu venis por venĝi pro mia malnova krimo, mia vivo estas kvazaŭ torĉo en la vento. Dum mi ankoraŭ vivas, mi devas fosi plu, se eĉ futon aŭ colon. Ne estas tempo mallabori. (Alrampas al la

* Ho, vizio klara, vizio pura, ho, vizio saĝa ĝis senlimo, ho, vizio kompatema kaj favora, ni apogas nin al vi por ĉiam, ni ĉiam levas la vizaĝon al vi en adoro. Via pura kaj nemakulebla lumo, kiel suno de la saĝo, detruas ĉiun mallumaĵon, humiligas malfeliĉon, fajron kaj ventegon, kaj prilumas hele ĉiun anguleton de la mondo. Figuro via kompatema regas tondron kaj tertremon, via favorema koro estas kvazaŭ mirindega vasta nubo, de kiu falas kiel dolĉa roso via sankta pluvo, estingante la flamon de surtera pasio.

rokmuro kaj batas pli forte ol antaŭe. Levante la voĉon.)** Ĵoojoo kjoo kanŝo. Hui gunĵin-ĉuu. Nebi kannon-riki. Ŝuuen ŝittaisan. Mjoo-on Kanzeon. Bonnon kaiĉoo on. Ŝoohi sekennon. Zeko ŝuĵoo-nen. Nennen moŝŝoogi. Kanzeon ŝooĵoo. Okunoo ŝijaku. Nooi sakuiko. (Svingas la martelon kvazaŭ freneza. Post momento Ĵicunosuke ŝtele alproksimiĝas de la maldekstra flanko de la scenejo kun nuda glavo tenata ĉe la talio per la dekstra mano, kaj palpante la vojon laŭ la tero per la maldekstra, li alrampas senbrue antaŭen. Rjookai, kvazaŭ tute neniom rimarkante, daŭre recitas la Sanktan Skribaĵon. Ĵicunosuke sin preparas por lin ataki, hezitas. Li fine levas la glavon, sed kortuŝite de la tutkora laborado de Rjookai, ne kuraĝas lin ataki kaj reinginte la glavon, estas forironta.)

Rjookai (subite sin turnante). Sinjoro Ĵicunosuke! Kial vi min ne mortigas?

(Ĵicunosuke, surprizite de la neatendita alparolo de Rjookai, restas senvorta.)

Rjookai. Vi devas esti ĉagrenata de la hodiaŭa aranĝo. Venu, prenu mian vivon. Nun ĉi tie estas neniu por vin malhelpi. Dum neniu venas por sin intermeti, jen mortigu min.

Jicunosuke. Rjookai, aŭ kiel ajn vi estas nomata,

** Kiam pro malpaco kaj batalo, ni enfalas en la manojn de oficiroj, aŭ kiam sur la batalkampo ni tremetas kaj timegas, ni apogas nin sur vian potencon ho, Kannon, kaj ĉiuj niaj turmentoj aŭ forflugas aŭ disiĝas. Ho, Kanzeon, la plej mirindega sono, ho sono de mistero, ho sono de la sankta ĉio, ho sono de la oceantajdo, supera estas vi el ĉiuj sonoj de la mondo, kaj pro tio ni por ĉiam laŭdas vin. Kaj ĉar por ĉiam ni laŭdas vin, vi ne lasas dubojn ekleviĝi inter ni, ho Kanzeon, ĉar vi estas pura, kaj en dolorego, agonio, morto kaj malfeliĉego, vi estas por ni nia vera apogilo.

nun mi kuraĝe atendos ĝis la tunelo estos preta. Pro la malkontento de militisto, kiu, kun la malamiko antaŭ si, devas atendi senfare, mi ignoris la promeson faritan kaj enrampis por vin disfendi, sed la flamo de mia kolero estingiĝis de via purkora kaj pia nobleco, kaj mi sentis honton alrampante kiel rabisto aŭ besto al vi, pia sanktulo, kaj la mano tenanta la glavon estis paralizata spite de mia koro. Mi do atendos pacience ĝis vi plenumos vian ĵuron.

Rjookai (sin klinante malalte kun la manoj sur la tero). Ĉu vi pruntos al mi, al la plej pekoplena bonzo, la tagojn necesajn por plenumi mian ĵuron? Akceptu miajn mil dankojn. Por ĉio ĉi, mi svingos la martelon ĝis mi pistos min en polvon kun decido trabori tute jam eĉ morgaŭ aŭ postmorgaŭ. Mi ne povas sufiĉe min senkulpigi kaŭzinte al fileca filo, kia vi, tiom da doloro. Bonvolu pardoni min. (Aliras al Ĵicunosuke kun mallevita kapo.)

Ĵicunosuke. Kvankam ni estas malamikoj, tio estas nia sortdestino, kaj aŭskultu, Rjookai, prefere ol atendi tie ĉi mallaboreme nur rigardante labori vin, la homojn, kvankam mi ne taŭgas tiel multe, mi prenos martelon kaj helpos vin, dehakante eĉ se nur kelkajn splitojn de ŝtono. La alproksimiĝo de la tago, kiam vi atingos vian celon, estas tiu de la tago, kiam mi atingos la mian.

Rjookai (kortuŝite). Vi trafis bonan ideon. Via helpo estas multe pli konfidinda ol tiu de miliono da kunuloj. Dum mi vidas vian vizaĝon, mi ne povas haltigi mian martelon eĉ momenton.

Ĵicunosuke. Anstataŭ ĉagreni mian koron atendante mallaboreme, al mi estos pli komforte mem svingi por la bono de la mondo kaj la homo. Do, sin-

joro Rjookai, ĝis la tunelo estos traborita, ni estos amikoj, sed...

Rjookai. Ha, en la momento, kiam la tunelo estos traborita, estu la truo eĉ nur unu aŭ du coloj transen, disfendu min en du pecojn. Mi sopiras la tagon, kiam via kordeziro kaj la mia estos plenumitaj.

Ĵicunosuke. Ĝis tiam estos interese por ni, malamikoj, svingi la martelojn unu apud la alia.

(Ili rigardas unu la alian kaj ridetas solece.)

Sceno III.

(La interno de la tunelo, kiel en Sceno II. Nokto de la deka tago de la naŭa monato en la tria jaro de An'ei, pli ol unu jaron post la okazaĵoj en Sceno II.

Iom malsame ol en la antaŭa sceno, Rjookai kaj Ĵicunosuke sidas flankon apud flanko en la mezo de la scenejo kaj kune svingas la martelojn seninterrompe.)

Ĵicunosuke. He!

Rjookai. Ho!

Ĵicunosuke. He!

Rjookai. Ho!

Ĵicunosuke (ripozante momenton). Jam la ŝtonhakistoj foriris, ĉu ne?

Rjookai (same ripozante). Ankaŭ ili laborigis sin kruele hodiaŭ la tutan tagon. Sinjoro Ĵicunosuke, ankaŭ vi ripozu. Jam pasis noktomezo. Nun vi ripozu.

Ĵicunosuke. Neniam. Malfrue en la nokto, la spirito estas klara kaj la energio duobla.

Rjookai. Post tia penlaborego en la lasta nokto, bonvolu retiriĝi iom pli frue por la hodiaŭa nokto.

Ĵicunosuke. Jen ĝuste tion mi volas diri al vi. Ĉu

estus juste, se mi ripozus antaŭ ol sesdekjara bonzo maljuna kia vi? (Levas la martelon kaj ekbatas denove kun »He!«)

Rjookai. Ho! (Batas responde.)

(Kelkan tempon ambaŭ laboras kune.)

Rjookai (denove ripozante). Hieraŭ unu el la ŝtonhakistoj diris, ke li aŭdis pafon de ĉasisto malklare inter du batoj de lia martelo. Ĉu vi aŭdis ĝin?

Jicunosuke. Kvankam mi ne aŭdis pafon, estis antaŭhieraŭ vespere, mi pensas, mi kvazaŭ aŭdis la unuan plaŭdon de riverfluo, sed tio povus esti sonĝo, ĉar mi dormetis kiam mi haltigis la manon.

Rjookai. Jam forpasis ĉirkaŭ unu jaro, de kiam vi venis. Ha, jam tuj venu la tago. Tiom pli, ke dum la lasta unu aŭ du monatoj, mia korpo kaj koro ambaŭ fariĝis fine tre malfortaj, tiel ke apenaŭ restas el mia antaŭa forto. Mi sentas, ke mia lasta horo venos jam hodiaŭ aŭ morgaŭ. Se mi mortfalus kun martelo en mia mano, mi ne povus esti justa al vi, ne parolante pri la bedaŭro de mia flanko, tial nun mi laboras laŭ mia tuta eblo, sed ho, jam mi alvenis la finon de mia toleremo. Ha, roko! Ho, roko; je tiu ĉi decido, disrompiĝu en polvon! (Ekbatas furioze.)

Jicunosuke. Nur la kuraĝon de diligento! Se vi nun falus, tio estus kvazaŭ disfendiĝo de korbo antaŭ la lasta plenŝovelilo. Tenu firman koron kaj atendu. Nun, ĉio dependas de volo. He! (Ekbatas sovaĝe.)

Rjookai. Jes, estas ĝuste kiel vi diras. Eĉ en simpla ekbato ne devas esti ia ajn nezorgemo, nek dubo. La potencon de Kannon! Ho!

(Ambaŭ, flanko apud flanko, batas kun ĉiuj siaj fortoj.)

Rjookai. Ha! (Forĵetante sian martelon, prenas la dekstran manon per la maldekstra.)

Ĵicunosuke (alkurinte al li). Kio estas? Kio estas al vi?

Rjookai. Tro forte mi batis rokon pli facile rompeblan ol ĝi aspektis, kaj la martelo en ĝin profundiĝis ĝis mia pugno. (Subite ekrimarkas truon sur la roko.) Rigardu! Stranga truo malfermiĝis!

Ĵicunosuke (proksimiĝante al la truo). Estas strange, la vento venas.

Rjookai (freneze). Kio! Kio! La vento venas? (Levas la martelon kaj sinsekve batas furioze. La roko disfalas sub lia atako kaj la truo pligrandiĝas.) Disfalas! Ĝi disfalas belege.

Ĵicunosuke (svingas la martelon freneze apud Rjookai). Traboriĝas! Ĝi traboriĝas belege.

Rjookai. Ha, la vento venas. La vento venas. Ĉu do la tunelo estas tramalfermita? Sinjoro Ĵicunosuke, rigardu atente.

Ĵicunosuke (enmetante la duonon de sia korpo en la truon). Ha, certe via ĵuro estas plenumita. Mi povas vidi malfortan lumon. Ĝi devas esti Jamakuni Rivero malforte brilanta en la mallumo. Sinjoro Rjookai, vere via ĵuro estas plenumita.

(Rjookai nur kunpremas siajn malplatojn kaj sin tordas, eligante sonon kiel ĝemo, sed ne povante paroli.)

Ĵicunosuke. Mi vidas! Mi vidas! Mi aŭdas! Mi aŭdas! Mi aŭdas la riverfluon. Mi vidas ion malklare blankan en la mallumo tuj sub miaj okuloj. Sendube ĝi estas landovojo. Sinjoro Rjookai, estu feliĉa.

Rjookai (eligas la voĉon por la unua fojo kaj ridas laŭte). Ho, ĝoje! Mi sentas, ke mi kvazaŭ eniras

la Ĉielon vive. La okuloj kaj oreloj estas tre kadukaj, kaj mi ne aŭdas riveron, sed mi povas vidi la malfortan lumon. Ho, ĝoje! Ĝoje! ĝoje! ĝoje! Mia koro bolas de ĝojego. (Ĝojtordiĝas.)

Jicunosuke (prenante la manon de Rjookai). Kompreneble, kompreneble. Se mi sentas tian ĝojon nur helpinte vin dum simpla jaro, kiel multe pli kompreneble vi devas senti ĝin hodiaŭ nokte, kiam post pli ol dudek jaroj de sufero kaj doloro, kun aprobo de Budaoj kaj dioj, vi plenumas la deziron de la vivo. Ĝoja estas ankaŭ mi.

Rjookai (subite rememorante). Pro tro granda ĝojo pri mi mem, mi forgesis. Ĉi tiu nokto kompreneble estas tiu tempo interkonsentita. Nu, forprenu mian vivon. Eĉ mi, se mi mortus en ĉi tiu ekstazo, certe reviviĝus estontece en la Pura Lando. Nu, forprenu mian vivon.

Jicunosuke (prenante la manojn de Rjookai). Sinjoro Rjookai, jam de longe mi forgesis ĉion. Kompare al via grandega laboro, en kiu vi turmentis vian korpon kaj spiriton dum tre longaj dudek jaroj, ĉu la venĝo estas plenumita aŭ ne, tio estas efemera afero de la homa mondo. Mi havis unu jaron de religia severeco apud vi kaj feliĉe liberigis min absolute de malica venĝemo de la sanga mondo. Rigardu! Ŝajne la luno trarompis la nubojn, ĉar venas la lunlumo.

Rjookai (enmetante la kapon en la truon). Ho, jen! Eĉ tiuj ĉi okuloj vidas la fluon de Jamakumi Rivero malklare.

Jicunosuke. Tiu ĉi lunlumo brilas kiel glorkrono vin ŝanĝanta en vivantan Budaon. Kaj por mi ĝi estas la lumo de Nirvano dispelanta mian malican venĝemon. Ha, refreŝiga lunlumo! Prefere ol vin bati, mi batos

la rokon tiamaniere. (Prenante martelon kun longa tenilo apud si, li batas kun ĉiuj fortoj. La roko dispeciĝas kaj la tuta valo de Jamakumi Rivero aperas en la nokto.)

Rjookai. Efektive estas plej agrabla luno, ĉu ne? (Denove rememorante.) Nu, sinjoro Ĵicunosuke, prenu mian vivon. Morgaŭ la ŝtonhakistoj, mi timas, malhelpos vin denove. Nu, forprenu mian vivon.

Ĵicunosuke (prenante la manojn de Rjookai pliproksimiĝanta). Kian sensencaĵon vi diras? Rigardu tien! Estas klare ĝis la montosuproj ĉirkaŭ Kakizaka, la kampoj kvazaŭ naĝas en la luna lumo. Ha, ĝi estas la lunlumo, kiu plenumis vian grandan ĵuron kaj lasas plu nenion por deziri.

(Ili prenas la manojn kaj restas absorbite de la lunlumo.)

Rjookai (baldaŭ elprenante rozarion kaj premrulante ĝin en la manoj). Altan saluton, Tonŝoo Bosacu! en la vivo nomata sinjoro Saburobjoe Nakagaŭa. Pardonu la perfidon de Rjookai.

(Plorante klinas la kapon.)

Ĵicunosuke. Venĝo estas sonĝo de la pasinteco. Levu viajn manojn. Pri tiu ĉi vespero de plenumiĝo de via kordeziro, ni ĝoju el la fundo de nia koro. Ha, ĝoje, ĝoje, ĝoje! Ho, ĝojo!

(Dum ili ĉirkaŭbrakas unu la alian kaj ploras, la kurteno falas.)

LA MIRAKLO

PERSONOJ:

Ŝukan, knabo kun razita kapo.
Oben, knabino.
Koo, *Ocu*, *Hei*, *Tei*, junaj bonzoj.
Tempo — Nefiksita.
Loko — Monteta antaŭurbo de granda metropolo.

(*Scenejo: La interno de la Halo de Emma en la korto de granda templo. Nokto. La pala lunlumo konturas la grandan figuron de Emma, Sinjoro de Infero. De malproksime venas la sono de fluto miksite kun konfuzaj bruoj de la granda urbo.*

Ŝukan, bela junulo en formo de bonzo, aspektanta, kvazaŭ li estus altiĝinta ĝis lia nuna pozicio el tiu de paĝio, ŝtele envenas tra la dekstra pordo kaj ĉirkaŭrigardas.)

Ŝukan. Bedaŭre! Oben ne estas ĉi tie ankoraŭ, ĉu ne? Prefere mi do legu Sanktan Skribaĵon pli atente. Nenio helpas. Estos bone pasigi tempon kun sinjoro Emma, mi pensas. (*Eksidas sur la altan plankon apud Emma kaj mallaŭte tamburas per siaj kalkanoj sur la piedestala plataĵo. Post momento, li surpriziĝas de la sono de voĉoj proksimiĝantaj al la Halo kaj stariĝas sur la piedfingroj por vidi. Venas tri junaj bonzoj, Ocu, Hei kaj Tei, kaj Ŝukan rapide okulserĉas la lokon por sin kaŝi kaj fine kaŝiĝas malantaŭ la statuon de Emma, dum ili envenas tra la maldekstra pordo.*)

Ocu. Ĉu vi pensas, ke la afero iros bone?

Tei. Sendube, ĉar Rjookan faras tion.

Hei. Se li malsukcesos, ni devos enlitiĝi kviete hodiaŭ nokte.

Ocu. Estos bone, se malofte.

Hei. Sed mi promesis iri hodiaŭ nokte.

Tei. Tiel same ankaŭ mi.

Hei. Someja atendas min.

Tei. Ankaŭ min atendas iu.

Ocu. Ankaŭ min atendas iu.

Hei. Ni do ĉiuj devas iri.

Ocu. Mi timas, ke tiu Rjookan fuŝos la aferon.

Tei. Ne timu. Jam de longe li forĵetis la konsciencon. Li estas knabo, kiu rigardas la konsciencon kiel ĝenaĵon. Por li ŝtelo estas nenio. Li diras, ke la mondo, persekutanta la ŝteliston, estas malbona.

Hei. Jam baldaŭ li devas reveni.

Ocu. La ĉefbonzo, la junaj bonzoj kaj la paĝioj — ĉiuj ankoraŭ sidas, tial li nun eble devas havi malfacilan tempon.

Koo (la kvara juna bonzo, envenas tra la dekstra pordo kaŝante ion en la maniko de sia robo). Ja estis terure malfacila laboro. *(Elprenas orumitan budastatuon el sia robo kaj montras al la aliaj tri.)*

Ocu. Jen vi sukcesis, ĉu ne?

Hei. Ĉu sinjoro ĉefbonzo ne rimarkis?

Tei. Ĉu la paĝioj kaj subbonzoj ne rimarkis vin?

Koo. Eĉ se ni fandos ĝin, ni povos havi gajan tempon du tri fojojn dank' al ĝi.

Ocu. Neniel oni devas ĝin! Certe ĝi havigos al ni tridek rjoojn en tiu formo.

Koo. Denove al Ŝimaŝoo hodiaŭ nokte, ĉu ne? Tie ni povas fari gajon tute laŭ nia maniero.

Hei. Sed ni revenu iom pli frue hodiaŭ nokte. Ni ne devas lasi, ke la ĉefbonzo suspektu kiel la lastan fojon. Li ankoraŭ scias, kiel peli sian konsciencon rilate al alies konduto.

Tei. Sensencaĵo! Kion li povus fari al ni? Por virino li fordonis Haramita-Kjoo'n propramane ekribitan de Sankta Kooboo Daiŝi. Se ni malkaŝus tion, li mem ne povus resti en la templo.

Ocu. Mi ne sciis, ke li faris eĉ tian aferon.

Tei. Tio estas nenio; la virinoj, kiuj venas kaj diras, ke ili estas liaj nevinoj en mondeca rilato, se ni pripensas, estas ja suspektindaj.

Hei. Ni do ĉiuj kaj eĉ la ĉefbonzo putras.

Tei. Ne nur ni homoj. La Budaoj. La ĉefbonzo mem rompas la malpermeson kontraŭ virino. La bonzoj kaj subbonzoj pensas pri nenio, krom proprigi al si la ofermonon. Ni nia-parte vizitadas al Mijagaŭaĉoo kaj Hanaĵimaĉoo. La ekspaĝio Ŝukan rendevuas kun Oben sekrete. Sed la majesta ĉefbudao povas fari nenion. Li ne povas puni eĉ unu aferon. Ŝukan blovestingas la sanktajn lampojn por la ĵus kisinta buŝo.

Hei. Ni legas Sanktan Skribaĵon transsaltante de fino al fino.

Tei. Homoj malboniĝas, ĉar Budaoj malboniĝas unue.

Koo. Ne, ne estas tiel. Ĉar homoj malboniĝas, Budaoj malboniĝas post ili. En la pasintaj tagoj, kiam la homoj estis justaj, tiuj Budaoj estis ĉiuj vivaj.

Tei. Ĉiuokaze rigardu tiun ĉi Sanktan Emma. Kvankam ni ŝtelis statuon kaj nun forvendos ĝin, tamen li povas fari nenion.

Hei. Sed li havas sufiĉe teruran vizaĝon, ĉu ne?

Tei. Estis tempo, kiam, nur pro la vizaĝo terura, la homoj timis lin. Estis tempo, kiam la homoj kredis lin nur pro la oraj radioj. Sed hodiaŭ la homoj estas aliaj; ili iom post iom kutimiĝis al lia terura vizaĝo. Ili tute ĉesis senti ion ajn pro la eksteraĵo sola.

Ocu. Estas vere. Kiuj timas lin, estas nur la infanoj sur la dorso de maljunulinoj. De kiam oni eksciis, ke tiu granda korpo estas simpla timigilo por teruri homojn, ĝi fariĝis tute sentaŭga.

Hei. Jam devas esti ĉirkaŭ la sepa; ĉu ni nun ekiru? Eble ili estus lacaj de atendado.

Ocu (mokeme, kiam li iras proksimen antaŭ Sankta Emma). Ni estas homoj kulpaj pri ŝtelo, diboĉo kaj mensogo. Sankta Emma, kiam ni iros en Inferon, estu al ni indulgema pro nia intimeco, mi petegas. *(Ridas. La aliaj ridas kun li, kaj tiam li parolas iom dramece.)* Se mi faras peton tiamaniere, ni povas fari ian ajn malbonaĵon laŭ nia volo. Nu, ni ekiru. Ĉu ni drinku en iu drinkejo, he?

Koo. Bone.

Tei. Do ni nun ekiru.

Hei (okaze rigardante returne al la vizaĝo de Emma, kiam li ekiras post ili). Ho, ĝuste nun la okuloj de Sankta Emma ŝajnis ekbrili.

Koo, Ocu kaj *Tei (iom surprizite, sed rapide redonante al si trankvilon).* Kiam sensencaĵon vi diras?!

(Hei fikse rigardas al Emma senvorte.)

Ocu. Prefere ol en drinkejo, ni drinku sekrete ĉe Umegen ekster la malantaŭa pordo. Tie ni povas pagi poste.

Koo. Estas bona ideo.

Hei. Do ni iru al Umegen.

Tei. Konsentite.

Ocu. Venu do.

Hei. Venu do.

Koo (subite rimarkante la statuon en la mano). Se ni iras al Umegen, tio ĉi estos ĝena.

Oou. Ni do povas poste reveni por ĝi. Kaŝu ĝin ie proksime.

Koo. Ĉu oni ne trovos ĝin?

Tei. Mi kaŝos ĝin en bona loko. Ĉiuj rigardu! *(Prenas la statuon de Koo kaj enpuŝas ĝin en la buŝon de Emma.)* Tio ĉi estas fama skulptaĵo kun kavo, tial estas nenio en la ventro. Se ni metas ĝin ĉi tie, eĉ Sankta Gaŭtamo ne scios pri tio.

Hei. La aktoro Kogenji Joŝizaŭa iam legis tian linion.

Koo. Ni do iru.

Tei. Ni ekiru.

Hei. Ni ekiru. *(Kiam li iras du aŭ tri paŝojn.)* Kiam mi iom rigardas returne, tiamaniere li havas teruran vizaĝon malgraŭ ĉio, ĉu ne?

Tei. Kiom ajn terura estas lia vizaĝo, se ni ludas per li tiamaniere, li estas senvalora. *(Ridas.)*

(Ili foriras kune. La juna Ŝukan elmetas sian kapon el sub la brako de Emma.)

Ŝukan. Jen estas friponoj. Sed mi mem ne estas bonulo miaflanke. Mi kaŝos min ĉi tie ĝis Oben venos.

(Por momento ĉio estas silenta. La knabino, Oben, bela kaj ĉarma eĉ en la mallumo, envenas ŝtele tra la maldekstra pordo. Ankaŭ tiu ĉi knabino rigardas trankvile ĉirkaŭ si, kvazaŭ ŝi neniom timus Emma'n. Fine ŝi malfermas la dekstran pordon iomete kaj enrigardas al la ĉefhalo.)

Ŝukan. Obenjo! *(La knabino surprizite provas forkuri.)* Estas mi. Estas Ŝukan. *(Saltas sur la plankon.)*

Oben (iom volupteme). Ho, vi surprizis min. Malica vi estas; mi pensis, ke min vokis Sankta Emma.

Ŝukan. Se vi prenas min por Sankta Emma, ĉio

estas finita. Sed eĉ mi mem konsideras min kiel pli bonan ol Sankta Emma.

Oben. Kvankam via vizaĝo estas bela, ĉu vi ne estas pli malbona ol Sankta Emma en la rolo, kaptante kaj formanĝante la homojn kvazaŭ mortintajn de amo?

Ŝukan. Ĉar mi hodiaŭ nokte vidis vin post longa tempo, ni ĉesu ĵeti malicajn vortojn inter nin kaj parolu pri nia amasiĝinta amo. Vi venis absurde malfrue, ĉu ne?

Oben. Patrino iris al la teatro en Kimiŭakamaĉi kaj revenis terure malfrue.

Ŝukan. Ĉiuokaze, mi ĝojas, ke vi estas ĉi tie.

Oben. Ĉu mi povus ne veni? Vi vidis la leteron, en kiun mi enfermis la ofermonon kaj lasis hieraŭ, ĉu ne?

Ŝukan. De nun vi devas ĉesigi tiajn riskajn ruzaĵojn.

Oben. Ne riskaj tamen. La ĉefbonzo ŝatas vin kaj vi traktas la tutan ofermonon. Eĉ se ĉio estus malkovrita kaj vi estus forpelita de la templo, mi nur povas preni vin al mia domo kaj karesi vin.

Ŝukan. Sed mi ne konsentos forlasi la templon. Vi iam vidos, ke ĉi tiu granda templo Ĉitokuin estos mia.

Oben. Naiva, vi estas naiva. Kiu povus aŭskulti serioze tion, kion la ĉefbonzo diris por amuzi vin, kiam vi estis malgranda paĝio?

Ŝukan. Atendu Oben. Ne taksu min tro facile. Estas vere, ke mi estas bonzo kun razita kapo, sed la ĉefbonzo estas ĝuste kiel pupo en mia mano. Observu min, ĉar mi baldaŭ montros al vi, kiel mi regas la tutan Ĉitokuin eĉ malsupre ĝis la polvo sub la vestiblo.

Oben. Naivulo! Se tia homo kiel vi fariĝos la ĉefo, Ĉitokuin estos en bonega stato.

Ŝukan. Sensencaĵo! Ĝi ne povas fariĝi pli malbona ol ĝi nun estas. Vi vidis kolorpresaĵon, kiun mi donis al vi antaŭ nelonge, ĉu ne? La ĉefbonzo sin amuzas rigardante tiajn bildojn.

Oben. Dio!

Ŝukan. Ĝi plaĉis ankaŭ al vi, ĉu ne?

Oben. Kompreneble jes. Mi portas ĝin ĉebruste. *(Elprenas la bildon el sia brusto.)* Io sur tiu ĉi junulino rememorigas vin. Io sur la flanko de ŝia nazo kaj buŝo rememorigas vin.

Ŝukan. Tiu ĉi, knabino, estas Tamanosuke Mineŝima de l' Jamamura Teatro en Nara, la plej granda dando en la tri provincoj.

Oben. Sed mi ŝatas vin pli multe.

Ŝukan. Tio estas komprenebla. Min, kiam mi estis dekunujara, petis la templo kaj Hiŝigane-no-Kongoo. La templo proponis dek rjoojn pli multe por mi, tial fine mi fariĝis razkapulo tiamaniere. Se mi surmetus la ĉapelon de katamito, mi ne estus venkita de l' tridekunu favoratoj de tiu ĉi urbego.

Oben. Vi parolas brave, ĉu ne?

Ŝukan. Dum mi ankoraŭ portis la harligon antaŭe, mi estis prikantata eĉ en kanteto kiel Hidenojoo de Ĉitokuin. Eĉ nun estas tre domaĝe, ke mi estas lokita por bruligi incenson.

Oben. Vi do neniam pensis sincere pri la aferoj de Budaoj, ĉu ne?

Ŝukan. Kompreneble ne. Al tiuj, kiuj preĝas al Budaoj nur de tempo al tempo, ili povus ŝajni bonfarantaj, sed se iu prizorgas ilin matene kaj vespere kiel mi, tiu fine tediĝas kaj volas prefere rompi ilin en

pecojn. Ĉar ili estas tuj apude ĉiutage, li sufiĉe sciiĝas, ke ili estas faritaj el ligno, kaj kiel ajn pene li provas pensi alie, li ne povas trovi ilin bonfarantaj. Bonzoj estas la plej malpiaj homoj en la mondo, mokante la Budaojn. La ĉefbonzo, eĉ ne lavante la buŝon post manĝado de kaviaro kun rizbrando, rekte sin turnas al la recitado de Sankta Skribaĵo. La junaj bonzoj iras al Hanaĵimamaĉi en ĉiu nokto. Verŝajne estas nur mi sola, kiu faras nenion.

Oben. Kaj vi ĉi tie faras amrendevuon kun mi tiamaniere, ĉu ne?

Ŝukan. Sensencaĵo! Mia peko estas kiel nenio. Krom la konkubulino, la ĉefbonzo havas kelkajn virinojn, kiujn li nomas siaj nevinoj. Kiam li purigas la ĉefstatuon, li traktas ĝin kiel pecon da ligno. Li ĉiam plendas, ke ne venas enterigpetoj. Li diras kutime, ke li deziras morton al la maljunulo de Naraja. Tio estas, ĉar la maljunulo promesis kontribuon de mil rjooj por havi la mezon por si eterne. Se ni turnas nin al la junaj bonzoj, ili estas duoble pli malbonaj. Hodiaŭ ili ŝtelis la sanktan trezorstatuon de Seiŝi Bosacu kaj intencas vendi ĝin por kovri la elspezon en Hanaĵimamaĉi. Kaj ĉu vi povas kredi, se mi diros, ke ili kaŝis ĝin en la ventron de Sankta Emma? Pro la aferoj irantaj tiamaniere, la mondo pereos en malbonaj tagoj, ĉar la rigardego de la Reĝo de Infero havas neniom da efekto. *(Iras al Emma kaj karesas lian vangon.)* Vi vere devas doni al vi pli da streĉo, ĉu ne, sinjoro Emma?

Oben. Mi ne ŝatas, ke vi iras al li tiel proksimen. Oni diras, ke li amas junulojn.

Ŝukan. Mi memoras, ke mi iam legis tian rakonton en iu legolibro. Sed kiel li povus amindumi

per tia vizaĝo? Ni du pare montru al li nian amon. Ĉu ne, sinjoro Emma? *(Denove karesas la vizaĝon de Emma moke.)*

Oben. Sed ĉu vi neniom sentas timon de Sankta Emma?

Ŝukan. Kial?

Oben. Mi ne timas lin kutime, sed kiam mi profundiĝas en amon kun vi kaj okaze ekrigardas lian vizaĝon, mi ofte sentas froston sur la dorso.

Ŝukan. Tio neniam okazas al mi. Ni estas tre intimaj, jam de kiam mi estis dekunu aŭ dekdu. Ĉu ne sinjoro Emma? *(Denove donas karesan frapeton al la vizaĝo de Emma.)* Mi ŝtelis oferkukojn kaj ĉiam alportis ĉi tien kaj manĝis ilin.

Oben. Mi dubas, ĉu Sankta Emma kaj la Budaoj efektive ne havas potencon por fari ion. Ĉar ili devas fari ion al tiuj, kiuj ŝtelas statuon.

Ŝukan. Kaj samtempe ili devas fari la samon ankaŭ al la fripono, kiu pekas kun virino antaŭ iliaj okuloj. *(Denove frapetas la vizaĝon de Emma.)*

Oben (iom serioze). He, vi devas ne tiel moki Sanktan Emma. Ĉu vi ne agas tro senbride?

Ŝukan. Kiu agas senbride? Kiam mi estis malgranda, ankaŭ mi pensis la Budaojn kaj Sanktan Emma tre grandaj, sed observante ĉion ĉiam, mi sciiĝis, ke ili estas tute senpotencaj. Kian ajn malbonaĵon faras la ĉefbonzo kaj la junaj bonzoj, ili povas fari nenion. Ĉar mi pensis, ke li estas trompanto, mi iam kraĉis prove sur la vizaĝon de Sankta Emma, sed nenia puno falis sur min. De tiam mi pensas pri li, kiel pri peco da ligno. Tio estas vero, ĉu ne Emma? Vi estas nenio alia ol peco da ligno, ĉu ne? Kion vi diros? Se tio ofendas vin, faru kion ajn pro tio. He,

Emma! Emĉjo! Eĉjo! *(Donas resonantan survangon al Emma.)*

Oben. Ho, mia kara! Ne agu tiel malpie.

Ŝukan. Sensencaĵo! Al tia aĵo jen tiamaniere! *(Levas la piedon kaj piedfrapas lian ventron.)*

Oben (per iom panika voĉo). Ĝuste nun la okuloj de Sankta Emma ŝajnis ekbrili.

Ŝukan. Malsaĝaĵo! Ĉu li estas kapabla je tia sprita artifiko? *(Donas al li alian piedfrapon.)*

Oben. Ho, kara. Jam vi devas ĉesi. Ial mi nun sentas min nervoza. Supozu, ke ekzistas Infero.

Ŝukan. Kiuj laboras kiel bonzoj, tiuj neniom havas kredon, ke ekzistas Infero. La Halo de Emma ĉe Ĉitokuin ŝuldas sian konstruiĝon al la enviemo de la ĉefbonzo kiu vidis la rimarkindan prosperecon de la Emma ĉe la najbara templo Daijunji en servistaj libertagoj. En la fina analizo, li estas instrumento por elpremi la poŝmonon de komizetoj. Ĉu ne vere, Emĉjo! *(Donas al li alian fortan piedfrapon.)*

Oben. Jam ĉesu. Ial mi sentas froston kaj mi tremetas. Ha, rigardu! Ĉu vi ne vidas, ke la okuloj de Sankta Emma tiel brilas?

Ŝukan (fine amuzite de la timo de Oben). Sensencaĵo! Tio estas de via nervozeco. Estas pli bone timi la vilan hundon en la strateto, ol timi tian aĵon. Ĝi povas okaze mordi vin.

Oben. Sed, kara, li aspektas pli terure ol kutime.

Ŝukan. Povas esti do, ke li havas kapdoloron pro mia piedfrapo tro ripetita. Ne, estas pli verŝajne, ke li havas ventrodoloron, ĉar li devis manĝi la statuon de Seiŝi Bosacu. Ĉu mi elprenu ĝin? (Iras sur la altan plankon de Emma kaj enmetante la manon profunde en la buŝon de Emma, serĉas la statuon.) De nun

estu pli atenta kaj ne lasu vin uzi kiel kaŝejon de ŝtelaĵoj. Kun tiel granda trunko, vi estas tute malkuraĝa, ĉu ne? Ne estas sufiĉe por vi simple elpremi la poŝmonon de komizetoj. Hola! Ĝi estas en lia gorĝo kaj ne elvenas facile. Hola, Emĉjo! Malfermu la buŝon pli larĝe.

Oben. Kara, la okuloj de Sankta Emma ŝajnis ekbrili kaj moviĝi. Jam estu sufiĉe. Jen, ĉu vi ne vidas, kiel liaj okuloj brilas?

Ŝukan (al Emma persiste). Ŝajne vi ankoraŭ povas timigi nur virinojn, ĉu ne?

Oben (kun la plej panika emocio). Ho, liaj okuloj moviĝas refoje.

Ŝukan (ankoraŭ persiste). Malsaĝaĵo! Ho! Ĝi tute ne elvenas. Emĉjo! Malfermu la buŝon pli larĝe, mi diras. *(Fine elprenas la statuon de Seiŝi Bosacu.)* Ili faris teruran aferon, ĉu ne? Aŭskultu, karulino, tio ĉi estas la sankta statuo de Seiŝi Bosacu el pura oro, trezoro necesega al Ĉitokuin.

Oben. Vi tiel mokis Sanktan Emma, ke mi timas, ke li malbenos vin iamaniere.

Ŝukan. Ĉu vi supozas, ke li estas tiel sentema? Sed atendu! Kiel ajn mi pensas, estas damninde, ke tiu ĉi Seiŝi Bosacu ŝanĝiĝu en la kapitalon de junulaĉoj por iri al Hanaĵimamaĉi. Estus multe, multe pli bone por Ŝukan kaŝi ĝin ie sekrete, ol lasi al tiuj friponoj forvendi ĝin malkare. *(Parolante enmetas la statuon en sian bruston. Ĝuste tiam aŭdiĝas la junaj bonzoj revenantaj en ebrieto kantante baladon. Ŝukan konfuzite.)* Ho, ili revenis. Venu, Oben! Ni devas nin kaŝi.

(Ili rapide sin kaŝas malantaŭ Emma. La junaj bonzoj, Koo, Ocu, Hei kaj Tei envenas.)

Koo. Ha, mi sentas min agrable.

Ocu. Se ni iros nun, ni estos tie ĝustatempe.

Hei. Estos tre interese iri Naŭate-straton dum kantado.

Koo. Krome, ni havas monon abunde. *(Al Tei.)* Nu, elprenu la statuon.

Tei. Jes, bone. *(Iras al Emma kaj enmetas la manon en lian buŝon.)* He!

Koo. Kio estas?

Tei. Estas strange. Mi ne povas trovi ĝin facile.

Koo. Retiru vin. Kiel tia absurdaĵo povas esti? *(Prenas la lokon de Tei kaj serĉas profunde.)* Estas strange. Ĝi vere ne estas ĉi tie.

Ocu. Ŝajnas neeble, ke iu estis ĉi tie, ĉu ne?

Hei (ŝajne iom frapite de paniko). Strange. Ĝi ne povas malaperi en malpli ol unu horo, ĉu ne?

Koo (ankoraŭ serĉante en la ventro de Emma). Ĝi ne povas malaperi en tiu ĉi malgranda stomako, sed — *(Al Tei.)* Ĉu vi certe enmetis ĝin?

Tei. Certe! Ĉu vi ĉiuj ne vidis min?

Hei (nun ŝajne en pli granda paniko). Ĝi estas Cukehimo Emma de Ĉitokuin, formanĝinta infanojn en la pasinta tempo.

Koo. Kiel sensence vi parolas? *(Parolante retiriĝas de Emma timeme.)*

Hei. Jen, ĉu mi ne diris al vi? Mi diris al vi jam ĉe la komenco. Mi diris, ke ni neniel devas esti tiel malpiaj, ke ni tuŝu al Seiŝi Bosacu. Kiel la protektanta dio de la ĉefepiskopo Rjoonen, ĝi estas mirinde sankta statuo, tial mi pensis de la komenco, ke kiel ajn degenerinta la mondo estas nun, ni devas dece nin deteni de ĝi.

Tei. Rigardu! Rigardu la vizaĝon de Sankta Emma! Li aspektas terure. Mi ial sentas nekomforte.

Koo. Kiel sensence vi parolas!

Hei. Mi ial sentas frostotremon. Ho, eĉ sekundon mi ne volas resti en tia loko. *(Retiriĝinte ĝis la pordo, subite ekkuras en granda rapideco.)*

Tei. Ankaŭ mi sentas froston en la korpo. Permesu min antaŭiri.

Ocu. Malkuraĝuloj, vere! Sed ankaŭ mi rememoris aferon, kiu ne permesas min resti tie ĉi tiamaniere. *(Hezitas, sed subite forkuras.)*

Koo. Ili ĉiuj estas malkuraĝuloj, vere! Sed neniom mi utilas restante tie ĉi sola. *(Sekvas la aliajn forkurante.)*

(Oben elrampas el malantaŭ Emma kaj estas forkuronta. Ŝukan kuratingante ŝin).

Ŝukan. Pro kio vi timas? Ili estas facile kaj tute superruzitaj de mi.

Oben. Lasu min iri! Mi tremas kaj ne povas elporti. Kaj ial mi sentas teruron restante apud vi. *(Parolante forŝiras sin de la manoj de Ŝukan kaj forkuras.)*

Ŝukan (restas sole). Kia kolekto da malsaĝuloj! *(Ridegas. Tiam kvazaŭ subite sentante panikon, veninta al li kun la malplena eĥo de lia ridego.)* Ankaŭ mi ial sentas froston. *(Okaze rigardante la vizaĝon de Emma.)* Ĝi estas terura vizaĝo malgraŭ ĉio. Kiam mi restas sola ĉi tie, mi komencas tremeti. Mi ial sentas malkomforte. Do, ankaŭ mi forkuru. *(Estas forrapidonta, sed subite rememorante la statuon de Seiŝi Bosacu en sia brusto.)* Ha, kun tia afero mi sentas min pli malbone. *(Elprenas la statuon, metas ĝin zorg-*

UFFICIO ESPERANTISTICO
MILANO - Piazza Obe

eme sur la genuojn de Emma kaj sin forpafas. Tiam Koo, Ocu, Hei kaj Tei revenas.)

Koo. Jen, ĉu mi ne diris al vi? Ĉar Oben elkuris post ni, certe ŝi estis kun tiu Ŝukan en la Halo de Emma denove. Se ni kaptos lin, ni povos ekscii, kie nun estas Seiŝi Bosacu.

Ocu. Vi estas prava. Ni tute ne bezonas timi Sanktan Emma.

(Ili iras proksimen al Emma kaj vidas la majestan kaj radiantan oran statuon de Seiŝi Bosacu sidanta trankvile sur siaj genuoj.)

Koo (surprizite). Ha! Jen ĝi estas ĉi tie.

Ocu. Ho!

Hei. Jen ĝi estas.

Tei. Ĝi estas.

Hei (kvazaŭ frapite de ia inspiro). Estas mirinde. Ĝi sidas tie ĉi preta por kulto. Kia sankta figuro!

(Koo, Ocu kaj Tei staras konsternite kaj silentas.)

Hei. Ĝi faris tiun ĉi mirindaĵon por nin admoni pro nia renegateco. Mi definitive min reformos. *(Surgenuiĝas kaj adorkliniĝas.)*

Tei. Estas mirinde! Estas mirinde! Ankaŭ mi intencas forlasi misagojn. *(Surgenuiĝas.)*

(Koo kaj Ocu, duone kredante kaj duone dubante, sekvas ilian ekzemplon kaj surgenuiĝas.)

(Kurteno)